Gustav Schwab,

Adiaŭo de studento

tradukita de Ludwig Emil Meier

Kantebla laŭ la melodio de Albert Methfessel (1785 - 1869)

1. Multjare mi studinta hom' -
- Adiaŭ nun, filistra dom'! -
Al hejm' malnova iras mi,
Nun mem filistro tie ĉi!

2. Adiaŭ, stratoj de la urb',
Ne plu promenas mi en kurb',
Nek kantos, nek bruigos ajn,
Nun decas min konvena ŝajn'!

3. Gastejo vi kun bier' kaj vin',
Vi jam ne plu gastigos min,
Ne logu via elpendaj',
Por mi ĝi estas nur vantaĵ'!

4. Vi universitato, ho!
Tre majestece staras do.
Tro longe en vi, haloj ĉi
Dum kelkaj hor' enuis mi.

5. Kaj vi, karcero sub tegment',
Vin mi memoras sen kontent';
Malbona loko, "pereat!"
al vi, de ĉiuj malamat'!

6. Sed vi, skermejo, vivu, ho! [2]
Ne vin forgesos mi, ne do!
Vi daŭre estu kun favor'
La pritraktejo de honor'!

7. Nun jen, ĉe l' amatina pord'
Ektuŝas min en koro mord' -
Vin lasi, bela, ho knabin',
Ja, vere, tio premas min.!

...

[2]En la origina teksto de L. E. Meier estas erare presita la vorto "skrimejo" anstataŭ la ĝusta "skermejo".

8. Sed for, antaŭen laŭ la voj'!
Malfermu vin por lasta foj'
Pordeg' malnova, ne tra vi
Revenos al la muzoj mi!

9. Nu, fratoj, akompanu min
Nur duonvoje al destin'!
Pro gaja kanto flugu for
De l' adiaŭo la dolor'!

10. En la vilaĝo gastu ni
En lasta bona harmoni';
Por lasta kiso, lasta ĝoj',
Nun for - nur esta unu voj'!

Traduko de la Germana poemo "Bemooster Bursche zieh ich aus" de Gustav Schwab *(∗1792 – †1850) en Esperanton de* Ludwig Emil Meier *(∗1847-02-16 – †1919) en 1907.*

Arg-80-157 (2003-12-28 22:55:11)